Zevende Jaargang, Nummer 5 Verschijnt vierwekelijks 11 Mei 1935

LABORISTA ESPERANTISTO
ARBEIDER ESPERANTIST

ORGAAN VAN DE FEDERATIE VAN ARBEIDERS ESPERANTISTEN IN HET GEBIED VAN DE NEDERLANDSE TAAL

Redactie: Middenweg 226, Amsterdam-O. || Secretariaat en Administratie van de Fed. van Arbeiders-Esperantisten: Postbus W 6, Amsterdam-W. || Postgiro Amsterdam No. 144698. Gem. Giro A'dam F 930 || In België: Esschenstraat 16, Antwerpen

Abonnementsprijs f 0,75 per jaar. Voor leden gratis. Oplaag 4700 exemplaren.

ONS GRONINGER KONGRES. ★

Een der beste kongressen, waarop onze Federatie steeds met genoegen zal terugzien, was zeker deze bijeenkomst van onze leden, getuigend van ons kunnen en willen. Nog onder de indruk van het aangenaam gebeuren, hoorden wij het een feest noemen en wij nemen dit woord gaarne over. Het moet een feest zijn, onze jaarlijkse samenkomst, getuigend van eenswillendheid en innerlijke kracht.

Dit kongres, welhaast drie dagen bijeen, toonde bij verschil van mening zijn daadkracht en sterke wil naar kameraadschap, een streven naar hoger doeleinde. Het kulturele karakter onzer organisatie, gepaard aan practische zin, demonstreerde zich ook hier. In de zekerheid, tot nut te zijn van de gehele arbeidersbeweging, is ieder huiswaarts gekeerd, met het vaste voornemen al zijn krachten te wijden aan de grootse taak, die ieder onzer zich gesteld heeft.

Onze jonge en kleine afdeling Groningen heeft het aangedurfd, dit jaar ons kongres te ontvangen. Boven alle lof is haar werk. Zo, dat de Hagenaars, die het volgende jaar het jubileumkongres zullen verzorgen, waarin onze Federatie haar 25-jarig bestaan zal vieren, moesten erkennen, dat het moeilijk zal zijn de Groningers te evenaren.

Reeds zaterdagmorgen was de stemming er in, het weer was met ons. Velen kwamen in de loop van de dag naar de „kongresejo".

De zaterdagmiddag zette Groningen al in het teken van esperanto. Groepjes „verdsteluloj", gewapend met de fraaie esperantogids van de V.V.V., ontmoette men overal in de gezellige drukte van de mooie stad. We waren hier al gauw thuis. Om 5 uur vond een excursie plaats naar het Natuurhistorisch Museum.

En wat de avond bracht, die ons tot middernacht bijeen hield, daarover was maar één roep: Keurig! Hier werkte de esperantojeugd mede. Zij heeft den ouderen een avond vol vreugd verschaft en van hoop op de toekomst voor onze mooie taal.

Hier speelden meisjes en jongens toneel in ongekunsteld esperanto. Zij deden niet onder voor de ouderen, die na wekenlang gezwoeg voor het welslagen van het kongres, zich ook hier lieten gelden met zang en toneel, afgewisseld door fijne muziek.

La sankta dejoro, welks opvoering met gespannen aandacht werd gevolgd, liet zelfs het kongres niet onbeinvloed, dat kwam te staan in het teken van „la sankta dejoro".



Groep deelnemers aan ons Gronings kongres.

Zondagmorgen werd de stad bezichtigd, waarna de middag, de avond en ochtend van de 2e paasdag in drie werkzittingen en een SAT-bijeenkomst werden doorgebracht.

Een uitgebreid verslag hiervan vindt men op de volgende pagina's, benevens de aangenomen resolutie, die, gezonden aan de arbeidersorganisaties opnieuw de aandacht hunner besturen vraagt en de weg wijst, die in deze begaan moet worden.

Aan onze leden de taak hierin diligent te blijven, er bij hun besturen op aan te dringen nevens de toepassing der richtlijnen dezer resolutie, in den vervolge onze kongressen bij te wonen opdat zij ook over het mondeling gebruik van esperanto een oordeel kunnen vellen.

De pers liet ons kongres niet onopgemerkt voorbij gaan en verwelkomde ons zelfs in het esperanto.

Het gemeentebestuur gaf eveneens van zijn belangstelling blijk, waar het ons begroette op de 2e paasdag in 't Stadspark, en aldaar een thee aanbood, genoten onder de gewaardeerde muziek van Door het Volk voor het Volk, waarbij de burgemeester, Mr. P. W. J. H. Cort van der Linden, in aanwezigheid van wethouder ds. I. van Hoeve, het kongres in voor ons streven waarderende woorden toesprak. Zelfs de beste linquist, volgens spr., beheerst slechts 'n beperkt aantal talen. Hij had dat ervaren op de internationale bijeenkomsten te Genève, waarheen spreker

meermalen afgevaardigd was en waar men zich van de spraakverwarring een goed denkbeeld kan vormen. De burgemeester lichtte dat met enige treffende staaltjes toe en wees er op, dat het esperanto een hechte band tussen de volkeren moet leggen. De stedelijke overheid van Groningen juicht elk middel toe, dat de vrede kan versterken, waartoe spr. hoopte, dat ook dit kongres zou bijdragen.
Hierna hield de Federatievoorzitter de navolgende toespraak en nadat de burgemeester en wethouder zich nog enige tijd met het Federatiebestuur inzake esperanto onderhielden, gingen de deelnemers aan dit welgeslaagde kongres uiteen onder dank aan onze ijverige Groningse gekamaradoj.

Toespraak tot het Gemeentebestuur van Groningen.

Mijnheer de Burgemeester, Mijnheer de Wethouder!
Overwegingen van propagandistische aard brachten ons er toe het kongres van onze organisatie te doen plaats vinden in dit gedeelte van ons taalgebied.
Wij hebben geen reden dit besluit te betreuren, want niet alleen is de belangstelling boven onze verwachting, — maar ook de gastvrije ontvangst van het gemeentebestuur van Groningen stemt ons tot vreugde.
In naam van de Federatie van Arbeiders-Esperantisten in het gebied van de nederlandse taal, dank ik u voor de woorden van welkom, waarmee u ons kongres hebt toegesproken.
Het is thans de twintigste maal, dat onze Federatie in kongres bijeen komt en telkens mochten wij konstateren, dat de belangstelling voor Esperanto, niet het minst onder de arbeiders, groeiende is.
Tijdens het bestaan van Esperanto heeft het wereldverkeer een ontzaglijke vlucht genomen en is verbeterd met de modernste middelen, die de afstanden verkleind, de grenzen vervaagd en daardoor een internationale taal van een wenselijkheid, tot een noodzakelijkheid gemaakt hebben.
De technische mogelijkheden brengen ons in aanraking met vreemde volken en scheppen ook de behoefte aan *geestelijke* toenadering, die ons in staat stelt elkander beter te achten en te waarderen. Het mag in deze sombere tijd er naar lijken, alsof wij van dit laatste integendeel hoe langer hoe verder verwijderd geraken, toch zijn wij er van overtuigd, dat deze toestand niet blijvend kan zijn, maar dat wij ook die moeilijkheden zullen overwinnen. Want ondanks alles leeft in ons de *hoop* op die internationale toenadering, broederschap en wereldvrede, die de groten onder de mensen hebben geïnspireerd tot werken, die voor altijd hun naam in de geschiedenis hebben vastgelegd.
Met zulke *hoop* was ook Dr. Zamenhof bezield, toen hij het grote probleem der veeltaligheid oploste, en het was deze hoop waaraan hij de naam ontleende onder welke zijn wereldtaal-ontwerp het licht zag, die ten slotte de naam werd van zijn taal, waarnaar ook zijn aanhangers zich hebben genoemd: *Espero, Esperanto, Esperantisten.*

Als wij arbeiders ons tot Zamenhof's schepping voelen aangetrokken, dan is het in de eerste plaats hierom, dat een internationale taal een machtig hulpmiddel is in ons streven naar een rechtvaardiger maatschappij, want wij zijn ons wel bewust, dat broederschap en wereldvrede niet alleen door het taalverschil belet worden. Tal van andere grenzen houden mensen en volken van elkaar gescheiden en dienen eerst te verdwijnen, willen de idealen van Dr. Zamenhof worden verwezenlijkt.
Ons streven om tot een samenleving te geraken, waarin geen onderdrukking, maar vrijheid, geen overheersing maar gelijkberechtigheid zullen bestaan, is een internationaal streven, dat een internationale taal behoeft. Onze idealen kennen geen grenzen: zij omvatten de gehele wereld.
Wij wachten echter niet, tot men officiëel het Esperanto heeft ingevoerd, maar gebruiken de taal reeds nu voor onze betrekkingen met geestverwanten in andere landen. Geen taalgrenzen belemmeren ons, ons met hen één te voelen.
Het is een typisch verschijnsel, dat waar andere talen, die men geleerd heeft, nagenoeg niet uitnodigen tot mondeling of schriftelijk verkeer met andere volken, dan slechts in die gevallen, waarin men er beslist niet buiten kan, — het Esperanto juist *dwingt* tot practische toepassing, tot het *zoeken* van internationale relaties.
Met Esperanto staat niet slechts een enkel land, een enkel volk, maar de *gehele wereld* voor ons open en onder de ruim 500 leden, waarmee onze Federatie in het afgelopen jaar is gegroeid en die dus nog geen jaar lid zijn, zullen er weinigen zijn, die nog geen aanknopingspunt in een ander deel van de aarde hebben gezocht en gevonden. Overal heeft de Esperantist zijn vrienden en zelfs de verste landen zijn voor hem niet onbereikbaar om daar nieuwe vrienden te verwerven.
Dit moge u aantonen, van hoe grote kulturele betekenis het Esperanto voor hem is: zijn ontwikkeling wordt er door bevorderd, zijn geestelijke horizon wordt er door uitgebreid. Hieruit blijke u tevens, welk een grote opvoedende kracht van het Esperanto uit kan gaan op *het kind*. Een onzer voornaamste doeleinden is dan ook het Esperanto op de scholen te doen invoeren, voor welk streven wij de overheid willen interesseren.
De belangstelling, die wij bij gelegenheid van dit kongres van u mogen ondervinden, geven ons het vertrouwen, dat te zijner tijd een beroep op uw college betreffende deze aangelegenheid in ernstige overweging zal worden genomen.
Sedert enige jaren heeft onze organisatie ook het onderwijs van Esperanto aan kinderen ter hand genomen en daarbij goede resultaten bereikt. Een kleine tentoonstelling van ons kinderwerk, die wij in een hoekje van de kongreszaal hadden opgesteld, gaven de bezoekers enigszins een denkbeeld van de grote betekenis van Esperanto voor de jeugd.
Evenals op al onze kongressen, vonden ook ditmaal de besprekingen geheel in Esperanto plaats en gaven daarmee aan de buitenwereld opnieuw het bewijs, dat Esperanto een *levende* taal is, die elke gemoedsstemming tot uiting kan brengen. Nuchtere beschouwingen wisselden af met hartstochtelijke ontboezemingen, terwijl de bekende humoristische noot niet ontbroken heeft.
Wij twijfelen er niet aan, of het plaats vinden van ons kongres in Groningen zal voor onze zaak, in het bijzonder deze stad en in de noordelijke provincies, van grote invloed zijn.
Uw belangstelling in ons streven en de gastvrijheid, waarmee u ons kongres hebt ontvangen zijn ons een grote morele steun, die wij ten zeerste waarderen en waarvoor ik u nogmaals dank zeg.

Resolutie Esperanto en de arbeidersbeweging.

Het 20ste kongres der Federatie van Arbeiders Esperantisten, gehouden op 21 en 22 April te Groningen;
konstateert de groeiende belangstelling voor de internationale taal Esperanto in alle kringen der bevolking en in alle landen, niet het minst onder de arbeiders,
neemt daarnaast waar, dat deze belangstelling zich meer en meer ook uitbreidt tot de leidende instanties in de arbeidersbeweging,
van mening, dat het gebruik van één internationale taal voor de goede verstandhouding der volkeren onderling veel kan bijdragen, maar zeker voor de arbeidersbeweging over de gehele wereld van buitengewoon veel nut en waarde zal blijken,
is van oordeel, dat meer dan tot nog toe moet worden aangedrongen op het praktisch gebruik, door elke arbeidersorganisatie, van Esperanto in internationale betrekkingen,
dringt er bij de instanties in de Nederlandse arb.beweging op aan, zich met de organisaties in het buitenland te verstaan omtrent de mogelijkheid te geraken tot een volledig gebruik van Esperanto, voorlopig naast andere talen, in correspondentie, bijeenkomsten en publicaties en het daar, waar mogelijk, reeds toe te passen,
en verzoekt deze, zich daartoe te verstaan met de Federatie van Arbeiders-Esperantisten, om het dienstbaarmaken van Esperanto in allerlei vorm onder het oog te zien.

TOELICHTING.
Het is de Federatie van Arbeiders-Esperantisten reeds mogen gelukken, haar ledental in enige jaren op te voeren tot 3000 in meer dan 100 afdelingen. Het aantal harer kursisten bedraagt jaarlijks enige duizenden en in de laatste winter zelfs 5000. Daarnaast zijn er evenzoveel of meer bij andere kringen der bevolking. Het buitenland deelt in die groei en steeds groter is het aantal deelnemers aan internationale kongressen, waar steeds één taal, 't Esperanto wordt gebruikt.
Waar dit mogelijk is gebleken bij allerlei conferenties buiten de officiële, culturele en arbeidersorganisaties, is het even gemakkelijk te bereiken in de meer gedisciplineerde en gelijkgeorganiseerde kringen der bevolking. Dit klemt te meer, omdat vele goede organisators en functionarissen der arbeidersbeweging niet over zoveel talenkennis beschikken, dat zij zich met de vertegenwoordigers van alle in internationaal verband bijeengebrachte nationale organisaties behoorlijk kunnen verstaan en het gebruik van tolken verre van ideaal kan worden genoemd.
Van de correspondenten mag geëist worden, dat zij Esperanto kennen, terwijl a.s., dus nog jonge, bestuurders zich de gelegenheid dienen te scheppen, om zich het Esperanto eigen te maken voor het gebruik reeds nu, en in de toekomst des te meer. Publicaties kunnen, zoals bij de Esperantisten regelmatig geschiedt, eveneens in Esperanto gesteld zijn, zowel als in de internationale arbeiderspers het Esperanto kan worden toegepast, eventueel voorlopig naast andere talen. De mededeling, dat in Esperanto zal worden

(*Zie vervolg 2de kolom.*)

(*Vervolg van 3de kolom.*)
gecorrespondeerd, zal het algemeen gebruik doen toenemen, terwijl men met Esperanto ook andere landen bereikt, waar mogelijk tot op heden weinig of geen contact was. Alsdan is het mogelijk, door de gebleken noodzaak, meer dan ooit te ijveren voor invoering van Esperanto op de school.

RAPORTO

pri nia 20a kongreso en Groningen, la 21-22an de Aprilo 1935

Malfermo.

Post kanto de la Internacio dimanĉe je 14.20 k-dino Lie Tillema-Heijnen, prezidantino de la LKK, bonvenigas la kongreson en la nomo de la LKK kaj sekcio Groningen.

Estas la forta deziro de la LKK, ke regu dum la kongreso la sfero de la hieraŭa festvespero. Espriminte la deziron, ke nia kongreso estu brilega sukceso kaj helpos en la disvastiĝo de nia lingvo, ŝi donas la martelon al k-do Faulhaber, la prezidanto de la Fed., kiu alparolas la kongreson jene:

Malferma parolado.

Karaj gekamaradoj,

En la nomo de la Federacio de Laboristaj Esperantistoj en la regiono de la nederlanda lingvo, mi salutas vin en tiu ĉi nia 20a kongreso. Precipe mi salutas la 25 novajn sekciojn, kiuj post nia lasta kongreso aliĝis al nia organizo. Saluton ankaŭ al gekamaradoj Nobes el Harrow, Anglujo, al la delegitoj de VARA, SDAP, Ned. Bond van Onderwijzers, Nosobe, Ĉefestraro de LEEN, sekcio Groningen de LEEN, kaj sekcio Groningen de NK.

Kvankam la antaŭa kongreso elektis Bussum kiel kongreslokon por la jaro 1935, la federacia estraro, interkonsente kun la federacia konsilantaro kaj la sekcioj Bussum kaj Groningen, decidis okazigi la nunjaran kunvenon en ĉi tiu urbo. Opiniante, ke el propaganda vidpunkto estas bone, okazigi kongresojn ankaŭ en tiuj regionoj, kie loĝas malmultaj niaj membroj, la fed.-estraro vaste konsideris tiun ŝanĝon kaj pripensinte la sukceson en Antverpeno, ĝi kuraĝis meti tiun punkton sur la tagordo de la Konsilantara kunveno en julio 1934. La decido ebligis al aliaj gekamaradoj, kiuj pro la granda distanco ĝis nun neniam povis viziti nian kongreson, hodiaŭ partopreni ĝin.

Dankon.

La Loka Kongresa Komitato fervore laboradis por prepari nian ĉiujaran manifestadon. Same kiel la Loka Komitato en Antverpeno, ankaŭ ĝi sukcesis interesi por nia afero la komunuman estraron, kiu morgaŭ akceptos nin en la urba parko.

Plue la LKK atentigis pri nia kongreso la Societon por fremdula trafiko en Groningen, kiu okaze de nia vizito eldonis sian gvidlibreton en Esperanto, tradukitan de kdo Degenkamp. Por tiu utila kaj prudenta ideo mi esprimas al tiu societo nian koran dankon.

Dankon ankaŭ al la gazetoj „Volksblad voor Groningen en Drente" kaj „Groninger Dagblad" kiuj per esperantlingva artikolo salutis la kongresanaron, kiel ankaŭ faris la semajna gazeto „Wij", hodiaŭ aperinta kun 3 paĝoj da esperanta teksto.

Krome mi esprimas dankon al *Haka* kaj la presejo *Dico*, kiuj siamaniere bondeziris al nia kongreso.

Ni scias kun kiom da amo kaj sindonemo la LKK kaj nia sekcio „La Norda Stelo" laboradis por fari al ni tiujn ĉi tagojn neforgeseblaj. Ilia tasko estis malfacila — iliaj zorgoj multaj. Sed des pli granda estos la rekompenco, kiam ili povos diri, ke ĉio okazis laŭdezire.

En la nomo de la Federacio mi kore dankas niajn gekamaradojn por iliaj penado kaj aranĝoj. Kaj mi esperas, ke nia kongreso vekos en niaj membroj en la nordaj provincoj fortan entuziasmon kaj grandan laboremon. Tiu ĉi kongreso disradiu vastan propagandon al ĉiuj lokoj kaj anguloj de ĉi regionoj; ĉie ĝi postlasu multajn semojn kies fruktojn oni kolektu en la plej proksima „Verda Monato", por ke post unu jaro nia organizo en la nordaj distriktoj povu fieri pri pluraj novaj sekcioj kaj multaj novaj kunbatalantoj. La aranĝo de nia kongreso pruvas, ke en tiu ĉi regiono troviĝas gekamaradoj, organize kapablaj, je kiuj ni povas fidi kaj esperi!

Rerigardo.

Karaj gekamaradoj!

Rigardante returne sur la vojo, kiun nia organizo iris post sia lasta jarkunveno, mi ekvidas du okazintaĵojn, kiujn neniu el ni povis antaŭvidi kaj kiuj plenigas nin per malĝojo kaj funebro. Antaŭ kelka tempo la vivon forlasis du fidelaj gekamaradoj, nome *Martina Kramers* kaj *Bernardus Eerdmans* (La ĉeestantoj leviĝas de siaj seĝoj).

La unua donis siajn fortojn al nia movado en Apeldoorn, la dua en Roterdamo. En siaj respektivaj sekcioj ili estis fervoraj laborantoj por nia afero kaj ekzemploj por siaj gekamaradoj. En movado, kia la nia, ni ne povas sendolore suferi tian perdon. Ni honoru ilian memoron daŭrigante nian laboron same fervore.

Sukcesa jaro.

Tiu ĉi nubo jetis ombron sur nia ĝojo pri la pasintjara sukceso. Ĉar sen tiu ĉi perdo ni povus diri, ke la jaro 1934 estas la plej bona jaro en la vivo de nia organizo.

Elstara fakto estas la „Verda Monato", tiu granda kaj grandioza forto-streĉo, per kiu ni montris, kion ni kapablas fari, kiam *unu deziro* kaj *unu celo* nin regas.

Neniam antaŭe ni povis fieri pri tia sukceso, kiu promesas riĉan rikolton post kelkaj semajnoj.

Venditaj estis:

5000 ekzempleroj de „Laborista Esperantisto";

11000 ekzempleroj de la broŝuro „Wat ieder van Esp. weten moet";

300.000 flugefolioj;

50 flagoj

1800 murafiŝoj

kaj preskaŭ 5000 lernolibroj.

73 ekspjozicioj kaj 33 kunvenoj subtenis la propagandan agadon kune kun la sciigoj kaj artikoloj de la gazetar-servo kaj ĝiaj helpantoj. Al 183 kursoj partoprenis 4350 personoj. 64 kursoj daŭrigaj kaj 23 kursoj por infanoj kompletigas la liston.

Multe da gvidantoj estas necesaj por subteni tiun laboron kaj ĉiujare kreskas la bezono je ili. La eldonado de „La Progresanto" estas modesta paŝo por eduki ilin. Ni esperas ke el ĝia studantaro venos novaj fortoj, kiuj siavice edukos aliajn, por ke nia organizo ĉiam povu plenumi siajn bezonojn kaj postulojn.

Diversaj nombroj, kiujn mi ĵus menciis, estas efektive pli altaj, ĉar kelkaj sekcioj ne respondis niajn petojn pri statistiko. Kaj ankoraŭ pli altaj estus tiuj nombroj, se eĉ ne unu sekcio estus malaktiva.

Dum la antaŭa kongreso, kiam nia federacio nombris 83 sekciojn, mi esprimis la deziron, ke en la kongreso hodiaŭa ni festu la fondiĝon de la 100a sekcio. Mi ĝojas, ke mi povas komuniki al vi, ke ni jam transiris tiun nombron: post la lasta komuniko en LE, aliĝis ankoraŭ la sekcioj *Emmen, Enkhuizen, Almelo, Hengelo* kaj *Den Helder*. Hodiaŭ ni havas 108 sekciojn!

Nia membronombro proksimiĝas al la tria milo. Nur momenton ĝi estis pli granda ol 3000, sed tro malmultaj novuloj transiris tiun nombron por firmigi ĝin. Sed baldaŭ la „Verda Monato" donos siajn fruktojn en tia kvanto, ke ni ne nur superos la trian milon, sed eĉ sen timo por refalo sub tiun nombron, marŝos celkonscie al milo kvara....

La Libro-Servo kaj nia eldonejo ankaŭ pasintan jaron montris sian utilon por la organizo. Dank' al tiuj ĉi entreprenoj ni ne bezonas plialtigi la kotizon, nek almozpeti per listoj kaj glumarkoj, kiel diversaj kulturaj organizoj laboristaj pro la reganta krizo bedaŭrinde devas fari. Nia sistemo de vendado kaj pagado obligas al niaj sekcioj havigi al si enspezojn, kiuj en nuna tempo pro la senlaboreco de multaj anoj ne estas akireblaj per nuraj kotizoj. Bedaŭrinde estas, ke kelkaj sekcioj ankoraŭ ne komprenas ĉi-rilate sian devon. Mendante niajn kaj aliajn eldonaĵojn ĉe privataj libristoj, ili flegas ties monujon, dum aĉetado ĉe nia „Libro-Servo" estas profitdona kaj por ili, kaj por la tuta organizo.

En la pasinta jaro ni eldonis:

5000 ekzemplerojn de „*Nia Lernolibro*".

20.000 ekzemplerojn de la broŝuro „*Wat ieder van Esp. weten moet*".

1000 ekzemplerojn de „*Tra la Labirinto*".

kaj en kunlaboro kun SAT la broŝuron „*Absolutismo*" en 3000 ekzempleroj.

„*Nia Lernolibro*" estas preskaŭ elvendita kaj nova eldono estas en preparo kune kun nova lernolibro pli simpla, de kdo *De Bruin*. *Tra la Labirinto* estas elvendita, la nova eldono en sama kvanto ĵus aperis.

Krom nian organon LE, kiu kun 1200 abonintoj el la kursoj atingis eldonnombron de 4700 ekzempleroj, ni eldonas *La Progresanto* kun 1300 abonintoj kaj *La Vojo* (por la infanoj) kun 150 abonintoj.

La malfacilaĵoj, kiujn ni spertis rilate la organizon de nia laboro por infanoj sentigis sian influon kaj estas kompreneble, ke ne tuj en la komenco nia laboro povis triomfi en la federacio. Sed ni ne malesperis. Ni, kiel laboristoj, kiel idealistoj, scias ja, kion signifas kaj kion postulas la pionira laborado por alta celo. Super ĉio staras la organizo en kies kadro ni devas laboradi kaj la historio montras, ke firma volo, celkonscia penado, oferemo kaj disciplino, kapablas krei tutan mondon el la *nenio!*

Kiu povus pensi ekzemple, ke el la 75 anoj en 5 sekcioj, kiuj antaŭ sep jaroj formis la restaĵon de organizo, pro internaj bataloj disŝirita — kiu povus pensi, ke el tiuj 75 anoj kaj 5 sekcioj, rezultos organizo kun 3000 membroj kaj 100 sekcioj kaj ĉio cetera? Tion kapablas pensi nur la idealismo; ne la malprudenta, la ĉikana aŭ la protestema idealismo, sed la praktika idealismo, kiu trankvile laboradas, kaj interne scias kaj estas konvinkita, ke nur al ĝi estos la venko!

Tiel ankaŭ *La Vojo* trabatos al si *vojon:* pri tio ni ne dubas. Malfacilaĵoj ekzistas por esti venkataj. Malrapide, sed senhalte la nombro da abonintoj plialtiĝas kaj espereble, ni povos ankoraŭ ĉi-jare presigi ĝin.

Kantareto kaj poŝa vortareto estas en preparo kaj plue ni konsideras la eldonon de kolekto de teatraĵoj kaj lernolibro por infanoj.

La kunlaborado kun SAT estis, kiel ĉiam, tre bona. Efektiviĝis, ankaŭ per la federacia partopreno, la 2a eldono de la „Plena Vortaro".

La nombro da SAT-anoj en nia organizo kreskis, sed tamen sentiĝas la manko de taŭga SAT-peranto, kiu sisteme propagandas la asocion en la tuta lingva regiono kun helpo de sekciaj perantoj.

Ni esperas, ke la morgaŭa Sat-anarkunveno revenos de sia decido de la pasinta jaro kaj elektos personon, kiu povos plene okupi sin pri tiu tasko.

Internacie.

En nuna tempo, kiam la nigra reakcio klopodas iom post iom detrui la kulturajn valoraĵojn de la laboristaro, kaj la internaciaj rilatoj iĝas pli kaj pli malfacilaj, ni alte taksu la posedon de **„Sennaciulo"**, kiu interkontaktas nin kun niaj amikoj ekster la limoj de nia lingvo-regiono.
La naciismo, kiu en la lastaj jaroj levas sian kapon, pli kaj pli montrante la intencon formanĝi la tutan homaron en ĉion detruanta milito, minacas la rilatojn interlandajn.
„Sennaciulo" ligas nin malkaŝe kun niaj samklasanoj en landoj liberaj, kaŝe kun kamaradoj en landoj faŝistaj. La vivo de nia organo fariĝos des pli malfacila, ju pli la reakcio penetras en la diversajn ŝtatojn.
Ni ne forĵetu nian internacian gazeton kiel la tagordo proponas, sed klopodu per saĝa kunlaboro perfektigi ĝin.
Kontraŭe ni singarde ĝin konservu kiel la solan solidan ligilon inter ni kaj niaj eksterlandaj amikoj. Ni pripensu, ke mono ne estas la sola kaj certe ne la plej ĝusta valormezurilo!
Kiam mi parolas pri niaj internaciaj rilatoj niaj pensoj direktiĝas al niaj kunbatalantoj en aliaj landoj kaj precipe al tiuj, kiuj estas sklavigitaj de la reganta faŝismo kaj plenumas sian devon por nia klaso sub la plej malfavoraj kaj danĝeraj cirkonstancoj.
Ni sentas nin unu kun ili en ilia sopiro al liberiĝo de la terura jugo, kiu premas ilin kaj de tiu ĉi loko, nia 20a kongreso, ni sendas al ili niajn plej korajn salutojn.

Kunlaboro.

Nia afero pli kaj pli penetras en la laboristan klason.
Iom post iom la gvidaj instancoj en la laborista movado fariĝas inklinaj aŭskulti nin, kiam ni petas atenton. Tamen ni ne ĉion konsideru venko, pro kiu batalo ne plu estus necesa.
Ke VARA denove interrilatas kun ni estas ĝojige.
Ke diversaj parlamentanoj kaj gvidantoj pretas paroladi por ni kaj verkadi artikolon por nia organo estas kontentige.
Ke diversaj laboristaj gazetoj akceptas niajn gazetarsciigojn aŭ esperantajn angulojn kaj kursojn estas laŭdinde.

Daŭre ni devas influi.

Sed ni ne forgesu, ke preskaŭ ĉiuj tiuj faktoj, estas rezultoj de **nia** penado, de **nia** proponado, de **nia** postulado. Tio signifas, ke en pli ol unu okazo la akirita favoro perdiĝos, se la organizo aŭ la esperantisto, kiu prizorgas tion, retiriĝos kaj ne povas anstataŭiĝi sin. Preskaŭ ĉiam, **ni mem** devas tenadi la fajron brulanta. Tial nia celo ne estas jam atingita per **tia venko.** Daŭre ni devas influi la gvidantojn de niaj sindikatoj kaj partioj, por ke ili konsideru niajn proponojn, petojn kaj postulojn ne nur „kiel voĉon de la amaso", kiun ili devas iom aŭskulti por resti bonaj amikoj, ne: ili ankaŭ **mem** devas senti la bezonon je internacia lingvo por la internacia batalo. Tial ni ĉiam montru la praktikan flankon de nia afero kaj nian sperton.
Gekamaradoj, nia laborkampo estas granda, sed tamen ni povas rimarki, ke ni progresas.
Sed ju pli ni progresas, des pli danĝere estas malstreĉi nian aktivecon. Ĝuste nun, kiam ĉiuj reakciaj atakoj estas direktitaj al laboristaj kulturaj akiraĵoj, estas necese persistadi en nia laboro.
La malnova mondo detruiĝas. La reakcia klaso sentas, ke ĝi ne povas reteni la disfalon de la hodiaŭa socio. Ĝia lukto kontraŭ la laboristaro estas lukto por savi sian favoran pozicion en la mondo.
Se ĝi iam venkos, la venka stato tamen ne povas daŭri eterne.

La sana vivo de nia organizo montras, ke nia afero estas vivipova; ke ĝi scias doni al multaj kamaradoj novan idealon, por kiu ili pretas batali, kaj scias renovigi ilian fidon en idealoj malnovaj, kiujn ili eble pro seniluziiĝo forlasis.
Dum la luktado de la reakciularo por konservi ĉi tiun socian sistemon, jam laborados aliaj por fondi socion novan, en kiu ne estos limoj, kaj en kiu la homoj sentos sin kiel fratoj kaj en kiu regos libereco kaj paco.
En la batalo por tiu nova socio Esperanto estas nemankipova.
Same kiel la antaŭaj kongresoj, ankaŭ la hodiaŭa servas ne nur por traktadi la organizajn aferojn de la tagordo, sed ĉefe por plifirmigi la solidaran senton, kiu devas ligi nin ĉiujn tiel por la ideo kiel por la federacio, ĉar sen tiu sento ne estas eble daŭre konstruadi ideon, kiu havas tiel gravan signifon por la estonteco de la homaro.
La unueco en nia organizo estas la sukceso de nia laboro. Tial ni agas saĝe, fortenante tiujn, kiuj per ĉiaj pretekstoj volas subfosi nian organizon, serĉante nur tion, kio **disigas** nin. **Ni** kontraŭe volas serĉi nur tion, kio nin **unuigas** kaj la historio, precipe en la lastaj jaroj, pravigas nin.

Gekamaradoj, estu tiu ĉi kongreso denove grava paŝo antaŭen sur la vojo al la efektivigo de niaj idealoj!
Mi deklaras la kongreson malfermita!



SALUTOJ.

La reprezentanto de Vara, sekcio Groningen, esprimis sian bedaŭron, ke li ne povas alparoli la kongreson en Esperanto. La sekcio volonte akceptis la inviton, des pli, ĉar denove la kunlaboro inter la Vara kaj la Federacio pliboniĝis. Esperanto ja estas grava helpilo ankaŭ por la radio; fakte tiu nur povas plene disvolviĝi per internacia lingvo, per kiu ni povas kompreni la disaŭdigojn, ne nur de la propra lando, sed de la tuta mondo. Finante sian saluton, li deziras al la kongreso la plej bonan sukceson.
La reprezentanto de la SDAP-sekcio, kdo v. Altena, ĝojas povi saluti la kongreson en ĝia propra lingvo. (Aplaŭdo). Kun granda intereso la sekcio sekvas la prosperon de esperanto, la tiel bezona helpilo por la akirado de pli bona kaj pli justa sociordo. Li deziras al la kongreso sukceson kaj batalemon por ĝia bela idealo.
Salutas nian kongreson, *Sro. Mr. Kalma,* delegito de la LEEN-estraro kaj de sekcio Groningen. Kun vera ĝojo, li diras, mi akceptis la taskon reprezenti nian organizon en tiu ĉi kongreso. Inter niaj du organizoj ja ekzistas agrabla kunlaboro. Mi nur bezonas mencii la ekzamenan aferon kaj la ĵus fonditan propaganda komitaton „Epoko". La batalo por justa solvo de la ekzamena afero estis por ni tre malfacila, kaj ni eĉ perdis pro ĝi kelkajn sekciojn. Sed tio ne povas deteni nin de nia devo doni al via organizo la rajtojn, kiujn ĝi prave klopodas al si akiri.

La sekcio Groningen de NK, volonte akceptis la inviton por esprimi siajn salutojn. Estu via kongreso fruktedona kaj por via organizo prospera!

La prezidanto dankas la reprezentantojn en la nomo de la kongreso. Apartan dankon li esprimas al sro Kalma, la reprezentanto de LEEN, kiu ne nur salutis, sed ne hezitis, kiam niaj kdoj estis superŝutitaj de laboroj, alporti sian helpon. Pro tio nian koran dankon. La dezirojn de la NK-reprezentanto li aŭdis kun aparta ĝojo, kaj li esprimas la esperon, ke rilate al la ekzamena afero fariĝos klara ĉielo kaj formiĝos unu komitato.

Tiam suriras la podion nia *kdo Israels,* kiu transdonas la bondezirojn en la nomo de Nosobe. Li ĝojas ke li povas fari tion kiel unu el nia rondo kiu celas same kiel Nosobe levi sin morale kaj konduki sin al pli alta spirita nivelo. Ni dum la lastaj jaroj havis multe da kunlaboro kaj ni spertis de vi la subtenon, moralan kaj financan kiun ni tiel bezonas. Kiam oni ĉirkaŭrigardas, oni multfoje ne povas veni de el sub la impreso, ke nia movado, anstataŭ progresi, malprogresas. Jen oni konstatas, ke frato atakas fraton kaj ke kamarado malhonorigas kamaradon. Sed la agado de via organizo al la nia montras la malon. En tio montriĝis io nemankipova en nia komuuna batalo, la amo al la proksimulo. Vi daŭrigu vian vojon eble malfacilan, sed kondukantan al pli bona socio.
La prezidanto, kdo Faulhaber, kore dankas kdon Israels pro liaj tre agrablaj vortoj. Ni ĝojas havi en nia mezo homon, kiu tiel dediĉas siajn laborojn al ambaŭ organizoj.
La sekr., kdo Veen, legas salutleterojn de SAT, IFETT, SDAP (Gron.), De Dageraad (Gron.), Volksonderwijs (Gron.), AJC (Gron), VVSU (Rotterdam-W.), IPE (tel.), kaj kdoj v. d. Eynde (tel), Spiegelenburg kaj de kdo De Lange, en kiu li informis pri la neeblo reakcepti funkcion en la Fed.-estraro.
En la voĉdonkomitato estas elektitaj kdoj Smit, Schotman kaj Altena.
El niaj 97 voĉdonrajton havantaj sekcioj ĉeestis 80; neĉeestas 17 nome: Aalsmeer Antwerpen, Assendelft, Bautsch-Terwinselen, Bilthoven, Broek in Waterland, Deurne, Deventer, Grouw, Huizen, Kerkrade, Maastricht, Nieuwerkerk a. d. IJssel, Rotterdam VIII, Stompetoren, Tessel kaj Wieringen. Ĉeestas 4 ĝeneralaj ĝemembroj kaj sen voĉdonrajto, la ĵus fondita sekcio Beets.

RAPORTO SEKRETARIO.

Haarlem II esprimas siajn laŭdojn pri „La Progresanto", sed bedaŭras, ke ne ĉiu membro ĝin abonis. Ĉu ne eblas fari tian aranĝon, ke la sekcioj enspezos la abonmonon ĉiusemajne?
La nombro da kursanoj estis 4000, sed montriĝis, ke nur 566 novaj membroj aliĝis. Kiel ni povas ŝanĝi tion? Ĉu eble la fed.-estraro scias vojon por tio? Pri la kunlaborado kun aliaj organizoj; kia estu nia sinteno en tiu afero?
Arnhem deziras fortan kunlaboron kun SAT. La nombro da SAT-anoj en nia Federacio devas kreski. Unu fakto almenaŭ estas, ke la du kotizoj kune estas tro altaj. La konvencio montris sian neceson kaj taŭgon dum la 6 jaroj de sia ekzistado. La kongreso jam nun estu atentigata pri la propono de Arnhem. Por la Verda Monato ni proponas, dividi la landon en kvar partoj, en kiuj unu post la alia ni faru nian propagandon. Tiam ni pli bone povas altiri ĉiun propagandon al certa regiono. La parto A de la ekzameno estas tro malfacila por laboristoj; ĉu la nova komitato volas atenti tion? La Progresanto estas laŭdinda kaj tre taŭga en la uzado, sed por multaj la libroj rekomenditaj ne estas pageblaj. Du partoj ne plaĉas al la sekcio. Tra la vortaro prezentas ofte sensencajn aferojn, oni ne tro serĉu. La korektotaj ekzercoj estas tute ne pedagogiaj. La lernantoj tenas la erarojn en la memoro.
A'dam XIII plenumas agrablan devon esprimi la dankon pri la laboroj de la Fed.-estraro kaj la kunlaboro de ĝi spertita. Ankaŭ la Libro-Servo tre kontentige funkcias.
Rotterdam I informiĝis pri la prezo de „Nia Lernolibro".
Kiam aperos nia Kantaro, pri kio la antaŭa kongreso decidis? Ĝi estas tre taŭga ilo por agrabligi la konversaciajn vesperojn. La Progresanto estas rilate la lingvan flankon tre bona. Ĝi estas jam ne mankipova. Ĉu ne eblas doni de tempo al tempo artikolojn pri socipolitiko?
La sekr., kdo *Veen,* respondante pri la procentaĵo de la aliĝintoj, sentas fortan surprizon pri tiu rimarkigo. Ni ja jam plene informis niajn funkciulojn pri ĝi per Interkontaktilo kaj en ĝi ni jam kongis aliajn ciferojn. Aliĝis proksimume 30% de la kursanaro, sed dum la sekvintaj monatoj tiom da membroj eksiĝis. Estas malsano kiu regas ĉe ĉiuj kulturaj organizoj kaj kiom ĝajnas aliaj esp. organizoj, kie restas la miloj da kursanoj de la radiokurso?

Kdo *Alings* aldonas, ke ni vendis pli ol 1500 membroatestojn, vi do povas facile kalkuli, kiom proksimume aliĝis. La Fed.-estraro jam okupis sin pri tio, sed la solvo ne estas facila. Unu grava rimedo estas, instigi la kursanojn al abono de nia gazeto. Tiel ili estas jam iom informitaj pri nia organizo kaj celo kaj pli emas al aliĝo. Multaj ne aliĝas aŭ eksiĝas pro la krizo.

La *prezidanto* respondante pri la kunlaboro, diras ke en okazo de kunlaborado la laboristoj ĉiam faris la t.n. malpuran laboron kaj la aliaj bonvolis rikolti la fruktojn. Tion ni tute ne deziras kaj estas bedaŭrinde, ke tiom el niaj kdoj tion ankoraŭ ne komprenas.
En malluma epoko de nia historio ni proponis kune sendi petskribon al la ministro, ke la doganoj rajtu porti verdan stelon sur la uniformo — kaj tiam venis la respondo, ke tio estas ekskluzive la tereno de LEEN. Sur la ĝenerala kampo ni aŭdigu nian voĉon. Kunlaboro? Bone. Sed en plena samrajteco. En la estinta E.K. oni proponis al ni lokon, sed en granda malplimulto, kion ni ĉefe pro tio ne akceptis.
Ion tian ni ne toleras. La solvon ni ankoraŭ ne atingis, la NEG kaj kompanio forte kontraŭas nin. Ili misinformis la ŝtatan reprezentanton kaj tiel akiris, ke la ministro favoris ilian komitaton. Se sekcio pro lokaj cirkonstancoj, kiuj kelkfoje estis sufiĉe influaj, devas partopreni kunlaboradon, ili ne lasu sin forŝovi, sed postulu siajn rajtojn.
Al la delegito de Arnhem li respondas, ke por la sendado de la ekspozicia materialo divido de nia regiono ne valoras. La plano eble teorie estas bona, sed ni ne scias kiel en la praktiko ĝin efektivigi. Rilate la ekzamenojn nur temas pri A 2, tio estas la tradukado de la nederlanda lingvo en Esperanton. Sed la diferenco inter nia ekzameno kaj la alia ne estas tiel granda. Krome la diplomo atestas pri lingva kapablo kaj ties posedanto do devas esti lingve kapabla.
Rilate al La Progresanto: Tiom da pedagogoj, tiom da oponioj. Montriĝis, ke multaj kursgvidantoj ankoraŭ devas lerni la korektadon. Estas mirige kiom da eraroj ili kelkfoje.... ne vidas. Tial la rubriko „Ter correctie" estas necesa. Rilate „Tra la vortaro"-n, denove, la praktiko necesigis ĝin pro erara tradukado. Ni donis parton el „La jaro 2000" de Bellamy. Sed ni devas esti singardaj. Laŭ niaj spertoj tiuj malfacilaj temoj allogas nur tre malmultajn.
Rilate al la prezo de la libroj, ni atentigas, ke studado ĉiam postulas monon. Tion ni ne povas eviti, kvankam ni liveras la librojn je malplia prezo kaj la studorgano por tro malalta prezo.
Plialtigo de la prezo de N.L. ne okazos. Ni ankoraŭ ŝvitas super la kantaro, sed ni eldonos ĝin plej baldaŭ.
Kdo *Alings* diras al Arnhem, ke li ne estas nekontenta pri la nuna rezulto de la konvencio. Jen prezentiĝas bona laboro por la nova SAT-peranto. La pasintan fojon la SAT-kunveno ne deziris elekti peranton, sed volis lasi la laboron al la fed.-estraro, kiu avertis ne povi dediĉi al tio tiom da tempo, kiom necesas. Bonan kontakton ni havas per Sennaciulo. Krome oni pensu, ke ankaŭ inter la SAT-anoj la krizo furiozas. Se la SAT-anoj deziras pligrandigi SAT-on, ili eklaboru, propagandu SAT-on kaj ĝiajn idealojn; ili ŝtreĉu siajn fortojn kaj ni subtenos tiom, kiom eblas al ni.

Arnhem rimarkigas, ke la peranto en la urbo spertis la malfacilaĵojn en la por SAT-a laboro. Precipe ili estas la financaj.
La *prezidanto* konsilas priparoli tion ĉe la koncerna propono.
Kdo *Prent* atentigas, ke la sekciestraroj multe povas helpi. Se ili semajne enkasigas la monon, la membroj devas pagi ĉiam nur malgrandan sumon.
La kongreso akceptas unuanime la sekretarian raporton.

RAPORTO KASISTO.

Hago I demandas, kial ne aperis bilanco. La posedoj ne estis troveblaj en ĝi, same kiel la kapitalo de la Libro-Servo.
Arnhem deziras, ke oni same kiel por vojaĝo, faru kalkulojn pri la kostoj de la tranoktado.
A'dam I demandas, ĉu eblas eldoni indekson al la skriba kurso.
Hago III rimarkigas, ke la subskribo sur niaj poŝtkartoj ne koincidas kun la bildo. Prefere la tekston oni ŝanĝu, ĉar la bildo donas la ideon de konstruado.
Kdo *Alings* respondante al Hago I diras, ke estas dube, ĉu ĉiuj membroj komprenas bilancon. La kasraporto estas pli klara; oni povis trovi en ĝi, kion oni bezonas dum librotenistoj povas facile kombini la ciferojn. La repagon de la restadokostoj krom la vojaĝkostoj ni povus pripensi.
La kasraporto estas unuanime akceptita.

—

RAPORTO LIBRO-SERVO.

Laŭ *Hago I* la Libro-Servo tro multe gajnas. La delegito voĉlegas vastan ciferaron, kiu montras, ke la Libro-Servo kulturas pli ol 40%an profiton. Li proponas plimalaltigi la prezojn de la libroj.
A'dam XVII demandas, ĉu oni en la Libro-Servo ne tro konfidas al nekonatoj?
A'dam II deziras scii, ĉu ne estas tro da risko, ke la debitoroj ŝuldas tiom da mono?

La *Fed.-estraro* esprimas sian miron pri tio, ke oni riproĉas nin pri la profito. Oni devas ĝin kalkuli de la vendoprezo kaj ne de la aĉetprezo. Kaj la profitoj ja venas en nian ĝeneralan monujon, la Fed.-kaso el kiu ni ĉerpas por subteni malfortajn sekciojn aŭ distriktojn. Oni bone komprenu, ke ne ni, sed la eldonistoj fiksas la prezojn kaj se ni propriniciate malaltigus ilin, tiuj rifuzus al ni liveri; kaj kapitalon ni nepre bezonas. Jam tro longe ni baraktis sen ĝi. Kaj ĉe nia propraj eldonoj ni devas atenti pri la fakto, ĉu ni forvendos ĉion. La kongreso kostas monon, la E.K. postulas monon, ĉu do estas skandale, ke la fed. havas kapitalon? Ni jam sukcesis plimalaltigi la prezon de diversaj libroj. Plena Vortaro devis esti antaŭpagita por ke SAT ĝin povu eldoni.
Neniu ĉe ni havas ian salajron. La honorarion kiun ni en alia okazo devus pagi al la verkintoj, ni nun povas uzi por nia organizo. Ĉiu helpanto faras sian laboron senpage, ni havas malmultekostan ejon por la LS ktp. ktp. Tio forte influas la profiton. Se ni devus ĉion pagi kiel en privataj entreprenoj, Hago I povus esti kontenta. Tiam la profito ne estus tiel alta. Cetere se ni devus pagi la verkintojn kaj ĉiujn aliajn, la prezoj de niaj eldonoj sendube estas pli altaj.
Tamen ĉe ĝusta kalkulado oni venas al profito de 26%.
Montriĝos do, ke ankaŭ bilanco ne estas bone komprenata. La ŝuldo ne estas tiel granda. La kalkulado okazis en la fino de Dec. parto jam estas pagita en Jan. Restas la „poparta pagado", kiu donas la impreson, kvazaŭ estus tiel granda la ŝuldo.
La raporto de la Libro-Servo estas unuanime akceptita.
Post tio la kongreso akceptas sendiskute la budĝeton.



LA 2a KUNSIDO

komenciĝas je la 20a horo per diversaj komunikoj kaj tiam sekvas la pritraktado de la Proponoj kaj Amendoj. (Vidu L E no. 3).

Kotizo.

Proponoj 1, 2 kaj 3 kun amendo.
Hago III deziras fiksi ĝin je 15c monate.
Arnhem defendas sian proponon. Ni devas plifaciligi la aniĝon al SAT. La Fed.-estraro deziras enkonduki sennaciecan spirition do la sekcio ne komprenas, ke la Fed-estraro estas kontraŭ ĝia propono.
A'dam IX estas por la proponoj 2 rilate pli malaltan kotizon por samfamilianoj kaj senlaboruloj. Multaj sekcioj suferas pro la krizo. La proponon 3 de Arnhem ni ne povas akcepti, sed ni rimarkis, ke la nederlandanoj devas pagi pli altan SAT-kotizon ol alilandanoj. Ĉu la fed.-estraro povas fari paŝojn ĉe SAT pri tiu afero? Nia fed. ja jam forte subtenas SAT-on.
Kdo *Alings*, por la Fed.-estraro respondas, ke la federacia kotizo estas multe pli malgranda ol tiu de la sekcio. Malaltigo de kelkaj cendoj en monato signifas preskaŭ nenion kompare al la sekcia kotizo. Se sekcio estas en financaj malfacilaĵoj, ĝi petu subvencion, por kio oni aldone sendu kasraporton kaj malgrandan budĝeton, el kiuj montriĝas la neceso. Rilate proponon 3 li respondas, ke, kiam la granda plimulto estus SAT-anoj, ni pli facile povus akcepti tian proponon. Ni eble povus helpi SAT per mono ŝparita pro la abonado de S-ulo. Oni bone komprenu, ke por 17½ c. monate ni ne povas fari, kio nun estas ebla. La Libro-Servo aldonas gravan sumon. Ni momente ne povas kontroli la SAT-kotizojn; eventuale ni interrilatas pri tio kun SAT. Vi cetere atentu, ke SAT kalkulas pri la diversaj vivniveloj. Pri la propono 2 a ni atentigas, ke jam la Amsterdama kongreso akceptis tiurilatan deziresprimon laŭ kiu la Fed.-estraro agis.
La kongreso akceptas, ke la kotizoj restu neŝanĝitaj. Por 2117; kontraŭ 110[1]).

Propono 4. Membreco.

Gent rimarkigas, ke la sekcioj mem kulpas en tio. En Gent ni simple postulas la kotizon 3 monatojn antaŭe.
La *prezidanto* respondas, ke ni enkondukis la sistemon por plisimpligi la administradon. Homojn, kiuj forlasis la organizon nepaginte sian kotizon, oni sen ia konsidero eksigu. Kontraŭ eventuala perdo de kotizo staras la profito kiun la sekcioj havas el la nepago de kotizo, ĉe aliĝo antaŭ fino de la kvaronjaro. Ĉe grava perdo la Fed.-kaso helpas.
Li proponas lasi la aferon kia ĝi estas.
La kongreso konsentas unuanime.

Ekzamena Komitato (Prop. 5 kaj amendoj.)

Hago I defendas sian amendon kaj opinias, ke la ekzamena komitato minacas formi ŝtaton en la ŝtato. Tiel por aliaj ne ekzistas eblo esti elektata en ĝi.
R'dam III subtenas la amendon b. Nur se iu ne estas mankipova, la fed.-estraro havu la rajton devii de la regulo.
Enschede opinias, ke nia unua zorgo estu, ke en la EK troviĝu la plej kapablaj. Pro tio ĝi estas kontraŭ la amendo de Hago I. Krome povas esti, ke la sekcioj ne kuraĝas kandidatigi siajn membrojn.
Hago III timas, ke la Fed.-estraro tiam havus tro da aŭtoritato. Ni zorgu pri ia rezervo.
La *prezidanto* respondas. Ni atentu, ke ni per la amendo b povas forigi la spertulojn. Al Hago III li respondas, ke la Fed.-estraro neniam deziras agi aŭtoritate. Ĝi ĉiuokaze restas responda al la Fed. Konsilantaro kaj Kongreso. Vere kelkaj sekcioj estas tro modestaj. Por la proksima ekzameno ni ankoraŭ ne ricevis unu anoncon.
La 5a propono estas unuanime aprobita.
Amendo a de Enschede estas akceptita per 1959 voĉoj por kaj 268 kontraŭ. Per samaj voĉoj oni malakceptis amendon b. de Hago I.
Hoek v. Holland reprenas sian proponon pro la ŝanĝo en la E K.
Hago III tamen petas, ke oni ne tro malfaciligu la ekzameno-taskojn.
Kdo *Faulhaber* opinias, ke ni ne povas toleri, ke laboristoj sentu sin pli malaltaj ol aliaj homoj. Ni estu pli sinrespektaj.

—

Propono 7 kun amendoj.

Pri fakaj sekcioj.
La *Fed.-estraro* proponas lasi la aferon kia ĝi estas. Ne eblas fari ĝeneralan regulon

[1]) Sekcioj Assendelft, Midden Beemster, Schermerhorn kaj West-Graftdijk ne ĉeestas.

por kategoriaj okazoj. Diversfoje montriĝis la avantaĝo de tiaj sekcioj, ekz. kiam la sindikatoj subtenas la sekciojn per donaco de lerniloj kaj disponiĝo de salonoj. Tiaj sekcioj devas havi ĉiam tute apartan terenon.
R'dam III demandas, ĉu estas permesate, ke esp.-istoj nemembroj fondas sekcion malliĝe de la jam ekzistanta sekcio.
R'dam I estas principe por la propono de la Federacia estraro. Tamen oni ne tro facilanime fondu novajn sekciojn, sed klopodu fortikiĝi la jam ekzistantajn sekciojn. Kiam finiĝas kurso de laboristoj en iu fabriko, oni volas fondi novan sekcion, kvankam la membroj loĝas en diversaj partoj de la urbo. Tiam estas la danĝero ke la fortoj restas disaj. Do ĉiu okazo devas esti aparte konsiderata.
A'dam IV ne komprenas, kial A'dam XVII estas kontraŭ la fakaj sekcioj. Tiuj ne malfortiĝas la aliajn grupojn. Krome nia dejoro deviĝas nin fondi propran grupon. Nia sindikato tre multe subtenas nin, morale kaj finance kaj ni, kiel sindikatanoj, havas la okazon enpenetri internen, kio al eksteruloj ne eblas.
R'dam V distingiĝas kategoriajn kaj fakajn grupojn. En la unua kuŝas la plej granda danĝero, ĉar ĝi minacas la supertendencon en nia Federacio. Pro tio ĝi ne ŝatas la politikajn grupojn, kiujn oni laŭ nia regularo rajtas fondi. La fakaj grupoj povas esti tre utilaj, sed ne okazu kiel estis en Rotterdam, kiam sekcio faris propagandon en ŝtampiĝejo, kiu situas en ĝia kvartalo kaj la metalista grupo protestis, asertante, ke tio estas ekskluzive ĝia laboro.
Hago III subskribas la opinion de R'dam I kaj estas por la amendo b de Enschede kiu celas malebligi la starigon de politikaj grupoj.
Ankaŭ *A'dam XVI* defendas la ekzistrajton de la fakaj grupoj. Ĝi instigas zorgi, ke parto de la ŝtata subvencio por klerigado de senlaboruloj estu uzata por la instruado de Esperanto.
A'dam I parte samopinias kun R'dam I. Nur estu fakaj sekcioj, kiam temas pri neregula dejoro, kiel ekz. ĉe tramistoj kaj fervojistoj.
Haarlem II proponas lasi la aferon, sed akcepti la amendon b.
R'dam IX pledas por la fakaj grupoj. La fed.-estraro juĝu pri ĉiu sin prezentanta okazo. La cirkonstancoj multfoje grave influas.
R'dam VII, kiu estas parte politika sekcio, volas atentigi, ke oni ne povas sendi la kursanojn tien, kien oni volas. El kurso de I.v.A.O. ekz. nur 3 iris al la diversaj grupoj. Temas pri tio, ĉu la sekcioj estas vivipovaj kaj laboremaj.
La *Fed.-sekr.* respondante, atentigas, ke kun la kreskado venis la malfacilaĵoj, kelkfoje sufiĉe premaj. Rilate al la fakaj grupoj, ni en la grandaj sekcioj komence ne havis malfacilaĵojn. Estis sufiĉe da spaco kaj aero por ĉiuj.
Nun ni jam proksimas al la sufiĉo. La propono venis pro la malfacilaĵoj spertitaj ĉe la aliĝpeto de la „Ruĝaj Batalantoj", kiu tuj ĉe la fondiĝo montriĝis ne esti vere faka sekcio. La Fed.-estraro pro tio decidis ne akcepti ĝin. Krome ĉe ĉiu aliĝpeto de kiu ajn grupo ni petas la opinion de la koncerna sekcio aŭ distrikto, ĉu urba, ĉu distrikta. Ĝenerala regulo estas tro rigida kaj la Fed.-estraro restas ĉiuokaze responda al la Fed.-konsilantaro kaj kongreso.
Tial la Fed.-estraro proponas lasi la aferon al ĝi.
La kongreso akceptas tion per 1918 voĉoj por kaj 209 kontraŭ.

—

Distriktoj. Propono 8.
La *prezidanto* diras, ke ni jam priparolis tuin aferon ĉe la antaŭa propono. Ĉu A'dam II konsentas pri libera agado al la Fed.-estraro?
A'dam II konsentas.

Proponoj 9, 10, 12, 13 kaj amendo al 11 (propono 11 estas reprenita.)
R'dam V atentigas, ke la klarigo estas reprenita, ĉar ĝi tro akcentis la financan flankon. Ni tamen ĉe eventuala disiĝo restos pagantaj la kotizon. La nuna situacio tute ne kontentigas. Se la urbaj sekcioj voĉdonus laŭ membronombro, ili tute superregus la alian provincan parton kaj estas same nedezirinde, ke urbo kun ekz. 1000 membroj havu unu voĉon, same kiel sekcio kun kelkdekoj.
Plej bone estas, ke la urbaj distriktoj estu tute memstaraj kaj havu siajn reprezentantojn en la konsilantara kunveno.
R'dam III parte samopinias kun R'dam V. Estas nejuste, ke ni ne estas reprezentataj, sed ni restu en la provinca distrikto, ĉar forlaso el ĝi signifas la pereon de la distrikto.
R'dam IX. En Groningen, Drente k.a. provincoj troviĝas nur malmultaj sekcioj kaj tamen ili vivas. La laboroj estas pleje farataj de Rotterdam. Ŝajnas al ni plej bone, ke ni dividu la provincon en du partojn, nome Rotterdam kaj ĉirkaŭaĵoj, kaj la kamparo.
R'dam I opinias plej grave, ke la distrikto havu reprezentanton en la Fed. Konsilantaro. La monafero tute ne ludas rolon. Same opinias kun R'dam V.
R'dam II samopinias kun R'dam I kaj V.
IJmuiden reprenas la 12an proponon.
Por la *Fed.-estraro kdo Alings* deklaras, ke ĝi ne kontraŭstaras la proponon 13, ke urbaj distriktoj estu reprezentataj en la Fed. konsilantaro. La aliajn prop. li konsilas neakcepti. Urba distrikto havanta almenaŭ 200 membrojn, do havos maksimume unu reprezentanton. La provincaj distriktoj havas min. unu reprezentanton kaj ĉe pli ol 500 anoj aŭ parto de tio ankoraŭ unu. Ĉu ni dekalkulu la membrojn en la urboj de la distriktoj provincaj aŭ ne, ni povos pritrakti en la venonta kunsido de la Fed. Konsilantaro. En la pasinta kunveno ĝi i.a. decidis, ke ĉiu distrikto estas libera rilate al la voĉdonado. Ne necesas, ke la urbaj distriktoj rekte reprezentiĝas en la kongreso. La sekcioj havas la rajton elekti pli ol unu reprezentanton, ili do povas krome elekti distriktestraranon. Ni neniam tro severe agas kontraŭ tiuj, kiuj volas fari rimarkojn en nia kongreso.
La kongreso malakceptas la 10an proponon. Kontraŭ 1874, por 353 voĉoj.
La kongreso akceptas la 13an proponon (urbaj distriktoj havu reprezentanton en la Fed. Kons.) per 996 voĉoj kontraŭ 935. 395 sindetenoj.

—

Propono 13 A. Kaskontrolkomitato.
estas sendiskute post klarigo akceptita.

—

Nia gazeto. Proponoj 14, 15, 16, 17, 18, kun amendo.
Hago III opinias la lingvopaĝon tre grava, sed ĝi tamen ne povas anstataŭi nian studmaterialon. Propono 17 ne estas akceptebla. Infanoj deziras kaj bezonas apartan gazeton, kiun ili povas nomi sia propra.
A'dam XVII rekomendas proponon 18. Ni nepre bezonas la lingvopaĝon por la senlaboruloj, kiuj ne povas aĉeti la diversajn studilojn.
A'dam III petas, ĉu ne eblas preni de tempo al tempo parton el „La Progresanto" por A, por niaj senlaboruloj, kiuj ne povas aboni ĝin.
R'dam I ne havas multe da fido en la nuna infangazeto. La infanoj devas aparte aboni kaj pagi.
A'dam IX plendas, ke el ĝiaj anoj (21) abonis La Progresanto-n, sed preskaŭ ne povas pagi la bezonatajn librojn. Ĝi proponas doni pli grandan rabaton al senlaboruloj.
R'dam III. La Fed.-estraro faris rilate O. T. paŝon multe bedaŭratan. Ĝi nepre ne povas samopinii kun R'dam I pri „La Vojo". Kontraŭe, ĝi estas tre taŭga kaj meritas la subtenon de ĉiuj niaj sekcioj.
Arnhem: Ni propogandis por L E, dirante, ke ĝi enhavas lingvan paĝon kaj subite venis la decido de la fed.-estraro, kiu tre embarasis nin antaŭ niaj kursanoj.
La redaktoro de L E, kdo *Alings*, respondante, diras, ke li preskaŭ ĝojas, ke la Fed.-estraro faris tiun eraran paŝon, ĉar ni sciiĝis per ĝi, kiel oni ŝatis nian gazeton ĝenerale kaj Taalblad precipe. L E aperas nun en 10 paĝoj anstataŭ en 8. Kaj ĉar kdo Degenkamp preferas ĝvidi nur la parton por la spertuloj, ni serĉas kunlaboranton por la parto por la komencantoj. Estas tute neĝuste meti infanan parton en nian gazeton, kaj redakti ĝin tiel, ke ĝi same taŭgas por plenkreskuloj, ne estas eble.
Kdo *Degenkamp*, ĉeestante kiel gasto, volas nur malmulte aldoni. Mi volonte prenas sur min la kunlaboradon. Se la estraro decidas ĉesigi, nu mi prenas la plumon kaj laboras, se ĝi decidas daŭrigi, nu mi denove prenas la plumon kaj laboras. Mi preferas daŭrigi en la gazeto, ĉar alie mi devas ĉion skribi pro tio, ke ankoraŭ multaj, kaj inter ili multaj kursgvidantoj, sin turnas al mi kun malfacilaĵoj.
Kdino *Lie Tillema-Heijnen* substrekas la vortojn de R'dam III. Infangazeto estu nur por infanoj. Ili deziras havi sian propran organon. Devas esti tiel, ke ili atendas la alvenon de la gazeto. „La Vojo" sendube kreskos, ni ne timu pri tio kaj mi jam nun dankas la ĝekdojn en la tuta lando pro la de ili montrita kunlaboro. Se la alfluo de abonantoj ankoraŭ iom da tempo daŭras, nia gazeto estos baldaŭ presata. Jam nun montriĝis, ke la infanoj tre ŝatas la gazeton kaj tio devas esti nia celo. La sekcioj ne hezitu starigi infankursojn, se vi havos malfacilaĵojn, ni ĉiam estos pretaj helpi.
Kdo *Alings* daŭriĝe diras, ke oni volonte vidas la infangazeton presita. Por 300 abonantoj ĝi liveras deficiton de proksimume f 400.— jare. Se la kongreso povas konsenti elspezi tian sumon, ankaŭ la Fed.-estraro ne estas kontraŭ. La rabato por librojn jam ekzistas por abonantoj de „La Progresanto", tiel ke ĉe aĉeto de f 12.— da libroj oni havas L P senpage.
Oni atentu, ke eblas aĉeti per poparta pagado. Ni nun reaperigas la lingvan rubrikon.

—

Propono 19. Ĉesi liveri S-ulon.
R'dam V faris al si la demandon por kio Dr. Zamenhof kreis sian lingvon. Por uzado nacia aŭ internacia? La naciajn novaĵojn ni povas legi en la nacia gazeto, sed por la internaciaj okazoj, ni volonte havas internacian organon. Sendube daŭros ankoraŭ longe antaŭ kiam la sennacieca ideo trovos sian lokon en la tuta mondo, sed daŭros ankoraŭ pli longe, antaŭ kiam Haarlem II komprenos sian internacian taskon. Ni malakceptu la proponon.
Arnhem tute substrekas la vortojn de R'dam V. Ni devas plifortigi la rilatojn kun SAT.
Hago III opinias, ke estus domaĝo, se S-ulo malaperus. Vere ne ĉiuj artikoloj povas plaĉi al ni, sed ni estu indulgaj.
A'dam II opinias, ke la nuna momento havas historian valoron. Postaj generacioj juĝos pri ni. La esprantomovado povas efektiviĝi nur internacie same kiel niaj idealoj. Ni nepre bezonas internacian gazeton kaj S-ulo estas tia.
Haarlem II scias, ke ĝi staras antaŭ grava entrepreno kaj ne atendas multan sukceson. Ni tamen faras la proponon, esperante, ke vi akceptos ĝin.
Mi laŭdis L E (la del. legas parton el sia artikolo hol. lingva) kaj la juĝo estis flata kaj mi rediras, ni havas bonegan organon. Mi tute ne sentis la bezonon doni piedbaton al SAT. Eĉ kontraŭe, ni estis al SAT tre dankaj, por tio, kion ĝi jam donis. Kiel eldonanto SAT faris bonegan laboron kaj se ĝi eldonus eĉ nur „Plena Vortaro"-n ni jam devus eterne esti dankaj al ĝi. Sed flanke de la eldonisto SAT, estas la organizo SAT. Kaj kiu vidas klare, konvinkiĝas, ke SAT, kiel organizo tute fiaskis. La historio de

SAT montras ĉiam la saman aspekton. Ioma kresko kaj skismo, kaŭze de la malĝusta strukturo. Kion pensi pri internacio, kiu havas en la tuta mondo, ekster nia lando dissemitaj nur 1000 membrojn.
Kdo *Veen:* Honoron al ili!
Haarlem II: Kiam SAT ne plu povis teni sin, la Fed. helpis ĝin. SAT ne estas morta, sed estos morta. S-ulo nomas sin internacia gazeto, sed sur 5-6 paĝoj troviĝas artikoloj el Francio aŭ Holando. Ni devas honti pri la enhavo de S-ulo. Diversaj artikoloj estas sub ĉia nivelo. Ĉiama troigo forprenas ĉiun fidon.
Zeist opinias, ke la granda plimulto ŝatas la gazeton. Ni konservu ĝin.
Dordrecht tute ne samopinias kun Haarlem II, kvankam kelkaj partoj en S-ulo ne plaĉas. Ĉu la Fed.-estraro ne povas sin turni al la redakcio de S-ulo pri la afero kaj peti, ke tiaj spritaĵoj ne plu aperu?
R'dam I tre ŝatas S-ulon. Unue el la sennacieca vidpunkto. Ĝi estas gazeto ne nur por, sed ankaŭ *de* la laboristoj. En diversaj gazetoj la intelektuloj bonvolas verki por la laboristoj, kiel ekz. en „Sur Posteno". Se la enhavo ne plaĉas al iu, tiu mem verku artikolon kaj sendu ĝin. Oni devas kompreni, ke la situacio de la redakcio estas sufiĉe malfacila. Se ni komparas kun unutendencaj organoj, la avantaĝo de la supertendenco plene evidentiĝas. Ni diru niajn opiniojn en nia propra organo.
La delegito de *IJmuiden* neas, ke la rakontoj en S-ulo estas troigaj. Li mem sendis tian rakonteton pri sia edukado. Unue la vero. Poste la afableco.
Adam X dankas en la nomo de multaj federacianoj kaj SAT-anoj la sekcion Haarlem II, pro tio, ke ĝi edligis al ni esprimi nian ŝaton al S-ulo. Tiaj okazoj estas sufiĉe maloftaj.
Kdo *Alings* opinias, ke post la multflanka defendo de S-ulo en nia kongreso ni bezonas diri nur malmulte. Sian opinion la Fed.-estraro jam konigis sub la propono. Vere kelkaj artikoloj povas pli bone esti neskribitaj. La Fed.-estraro transdonos la deziron de la kongreso al SAT, sed influi ĝi ne povas nek deziras. Cetere ĉiu abonanto rajtas sin turni al la redakcio. Ni ne povis akcepti la laŭdon pri L E, ĉar ni scias, ke ankoraŭ multe mankas al ĝi. SAT jam estas bezonata organizo pro siaj kongresoj, kiujn neniu alia instanco povas organizi. SAT malkreskis ne sole pro la skismo, sed precipe pro la krizo kaj pro la fakto, ke ĝi estas malpermesita en la landoj kun diktaturo.
La kongreso malakceptas la proponon. Por nur Haarlem II (47 voĉoj). Kontraŭ 2176 voĉoj.
La kunsido finiĝas je meznokto.

★

3a KUNSIDO.
2a Paskotago 9.30 horo.
Ĉar kdo Altena estas okupita de aliaj kongresaj laboroj, li estas anstataŭigata en la voĉdonkomitato de kdino Smit-Mulder.
Ĉi tiun kunsidon ree ĉiu delegito ĉeestas.

Reprez. en SAT-Kongresoj. Propono 20.
R'dam III opinias, se nur temas pri libertempo, ke la salajroperdo devas esti repagata el la federacia kaso.
Hago III deziras, ke la federacio estu konstante reprezentata.
Kdo *Alings* respondas, ke plejfoje fed.-estrarano aŭ konsilantarano ĉeestas la SAT-kongresojn. Povas esti dezirinde, ke rilate gravajn aferojn nepre iru estrarano. La fed.-estraro preferas, ke la kongreso akceptu ĝin kiel deziresprimon, por ke la fed.-estraro havu liberon en tio.
La kongreso akceptas.

Kalendaro. Propono 21.
Diversaj sekcioj tre deziras, ke la kongreso akceptu ĝin. Ĝi ja povas havi bonan propagandan valoron.
La *prezidanto,* kdo Faulhaber, respondante, diras, ke la afero estas krom ĉio ankoraŭ tre riska, ĉar kalendaro rapide malnoviĝas. Ni esploros.

Kongresloko. Propono 22 kun amendoj.
La *prezidanto* antaŭe jam atentigas, ke ĝi estos nia jubilea kongreso.
Gent verve pledas por sia propono. Ni nepre bezonas kongreson por helpi nin en la propagando.
R'dam I rekomendas Hagon, kondiĉe, ke la tuta distrikto invitos nin.
Arnhem opinias same.
Hago I, II, III, estas kontraŭ Gent. La pasintan jaron ni jam estis en Flandrio.
Nia jubilea kongreso okazu en Hago, la urbo, kie la federacio fondiĝis. La distrikto plene konsentas kun la invito.
A'dam II kaj *V* pledas por Amsterdam.
R'dam V subtenas Gent.
R'dam II estas por Hago. Pro la kriza tempo oni ne povas multe elspezi por la vojaĝkostoj. Laŭ Enschede estus bone, se ĝi okazus en Amsterdam, kie troviĝas la centro de la socialista movado. Ĝi tamen ne estas kontraŭ Hago.
Hago III konigas, ke la hagaj sekcioj kunvenis antaŭ la kongreso. La haga distrikto sendube faros sian eblon egaligi la Groningenanojn en la organizado. Ĝi samtempe kaptas la okazon por esprimi siajn dankon kaj miron pro la belega akcepto. En tagoj, kiaj la nunaj kaptas nin la ideo, ke Esperanto ne venkos, sed jam venkis. (La kongreso substrekis tion per elkora aplaŭdo.)
Kdo *Faulhaber* konigas la opinion de la Fed.-estraro. Ni jam estis en Flandrio. Nun en negranda urbo. La sekvontan fojon ĝi okazu en granda. En Amsterdam ni estis en 1929 kaj 1933, en Hago lastfoje en 1928. Hago sufiĉe bezonas la propagandon. Ni elektu Hagon.
La voĉdono rezultas jene: Por Gent 247 voĉoj; A'dam 602; Hago 1509.
Do la kongreso en <u>1936</u> okazos en Hago.

—

Elekto Federacia Estraro.
La kongreso esprimas kiel sian deziron, ke la 7 estraranoj kiuj reakceptis, restu.
Por la vaka loko *A'dam XIII* rekomendas kdon De Geest; li jam dum multaj jaroj servas en nia organizo. Antaŭe li estis prezidanto en Enschede. Vi konas lian laboron. Li estas la desegninto de nia afiŝo. Aliaj kaptas la okazon rekomendi kdon Vrees.

Kdo *Faulhaber* kiel prezidanto de la Federacio volas diri ankoraŭ kelkajn vortojn pri kdo De Lange. Li okupis lokon, kiu ne metis lin en la antaŭan fronton, sed sian — tre gravan — laboron li faris akurate. Ĉiumomente, eĉ kiam li estis plene superŝutita per laboro pro la alfluo de la kvaronjarlistoj, li tuj povas diri: tiom da membroj ni havas. Ni esprimu al li pro tio nian elkoran dankon.
Aplaŭdo.
La kongreso elektas kdon Vrees per 1412 voĉoj. Kdo De Geest ricevis 200. Estis 746 neŭtralaj voĉoj.

—

Elekto Konfliktkomitato L E.
La malnova konsistis el la kdoj Kruit, Muller kaj Liedermooij. La lasta jam ne estas membro kaj pri kdo Muller ni ne scias, ĉu li akceptas.
Kdo Kruit reakceptas kaj la kongreso aldone elektis la kdojn Preker kaj v. Lier.
Por la kaskontrola komitato elektiĝas kdoj Kroese, Mitteldorf kaj Tertaas.

—

Rezolucio (vidu paĝon 42).
La *prezidanto,* voĉlegas rezolucion, proponitan de la fed.-estraro kaj sendotan al la gazetaro kaj ĉiuspecaj organizoj. Ĝi atestas pri la kresko kaj pli kaj plia oficialiĝo de Esperanto. *La kongreso unuanime akceptas ĝin.*

—

Libera diskutado.
Stadskanaal legis, ke ni subvencios la Lingvan Komitaton. Ĉu eblas fari tion ankaŭ en la nomo de SAT, ĉar tiuokaze, ĉiuj LEA-oj konvencie ligitaj havus el tio profiton kaj povus proponi kandidatojn.

A'dam XV aŭdis pri la sukceso de La Juna Vivo kaj volonte scias la kialon de la foriro de kdino Veenendaal-Bouwens. En L E ni legis nur la opinion de la fed.-estraro.
Hago III deziras, ke ni forte subtenu „La Vojo"-n, tamen bedaŭras, ke La Juna Vivo ne estis akceptita.
Dordrecht ĝojas pro la apero de esperantaj tradukoj en „Wij". Tamen en la tradukoj troviĝas eraroj.
R'dam V havas la agrablan taskon povi esprimi la dankon de la biciklantoj pro la spertita kunlaborado en la gastigado al Groningen kaj Zwolle. Krome ili deziras, ke ni ŝanĝu la strukturon de nia organizo plene en centran organizon. La fed.-estraro esploru la eblon.
R'dam III tre ŝatus, se la federacio povus eldoni facile legeblajn libretojn. Ni sukcesigu nian infangazeton.
A'dam XIII ŝatas eldonon de murkalendaro
Hago IV deziras, ke la fed.-estraro de tempo al tempo invitas eksterlandanon por paroladi.
La *prezidanto* diras, ke la subvencio al la L K okazas nur de la federacio. Nia kaso nun permesas plenumi tion. Ni devas montri nian intereson pri tiu institucio, kiu lastatempe klare esprimiĝis ne aparteni al unu el la movadoj. La pritraktado de La Juna Vivo devus okazi ĉe la pritraktado de la sekr. raporto. Pri la Fed.-strukturo ni jam decidis antaŭ du jaroj. La nuna formo ŝajnas al ni plej bona, sed ni povas denove esplori. La legolibroj jam havas nian atenton. Se R'dam III havas sugestojn, ĝi sendu. Ni esploros la aferon pri murkalendaro. Ni same faros pri invito de parolantoj.
Kdo *Alings* aldonas por la Fed.-estraro, ke la nederlandaj L K-anoj misuzis sian L K-anecon. Ĵus ni sciiĝis, ke frater v. Zon estas elektita, kvankam ne vakis nederlanda loko. Ni proponas por la Lingva Komitato regule kandidatigi niajn kompetentulojn en la venontaj jaroj, kaj prezentas kiel unuajn niajn kdojn Faulhaber kaj Degenkamp.
Stadskanaal rimarkigas, ke la L K **tamen** raportas nur en UEA-kongresoj.
Kdo *Alings:* Ni interkonsiliĝos kun SAT, kaj restos pri tiuj aferoj en kontakto kun la L K. Pri La Juna Vivo oni sendis al la red. de L E nur cirkulerojn ne subskribitajn, kiuj samtempe al ĉiuj sekcioj ktp estas dissenditaj. Al presaĵoj ni ne respondas. Antaŭe la red. de „Wij" ne volis akcepti esp.-tekston, sed poste ŝanĝiĝis. Mi tradukas sed ricevas la tekston tre malfrue kaj korektoprovon mi ne ricevas. Se la tradukoj ne taŭgas, tiam pli kompetenta kdo transprenu la taskon.
Haarlem II atentigas, ke neniel estis la intenco ofendi. Ni faris la proponon pri S-ulo, por la praktiko kaj ni ne ŝatas la strukturon de SAT.
Arnhem diras, ke li supozis, ke la propono venis de NUK, ĉar la enhavo de Ruĝa Batalanto tion sugestis.
R'dam III petas malplikostan leterpaperon ktp. Sed la papero de la federacio estas sufiĉe multekosta, ĉu eblas uzi malplibonan paperon.
Kdo *Kroonder* por la L S rimarkigas, ke ni jam nenion gajnas per la papero kaj kdo Faulhaber diras, ke ni estas konataj eĉ trans la limo pro la kvalito de niaj eldonoj.
A'dam XIII demandas, ĉu ne eblas eldoni apud la granda, poŝdiplomon.
Kdo *Faulhaber* priparoliĝos la aferon en la E.K.

La *prezidanto* nun dankas la LKK kaj la sekcion „La Norda Stelo" por ĉio, kion ĝi faris por ni, kaj esprimas la deziron, ke Hago same bone akceptos nin la sekvontan jaron. Post tio li fermas la kongreson per jenaj vortoj:

Karaj gekamaradoj!

Nia 20a kongreso pasis. Laŭ ĉiuj vidpunktoj ĝi estis bona kongreso.
Laŭ vidpunkto organiza ĝi montris, ke

niaj anoj komprenas, kian taskon nia organizo havas precipe en la nuna tempo, lande kaj internacie; ĝi denove konfirmis kaj tute klare esprimis la utilon, la neceson de internacia organo kaj montris, ke „Sennaciulo" ĝenerale estas tre ŝatata; same klare ĝi vidigis al ni alian flankon de nia laboro, nome tiun por la infanoj, kiu laboro ankoraŭ ne estis sufiĉe akcentita en nia organizo, sed ricevis nun pli klaran formon, precipe per la praktika ekzemplo en la interkamarado vespero.
Laŭ lingva vidpunkto ĝi montris, konservinte la lingvan rubrikon en nia organo, kiom niaj anoj ŝatas tiun parton de nia tasko. Krom tion, ni notis ion alian: en tiu ĉi kongreso aŭdigis sin ankaŭ novaj parolantoj, kamaradoj, kiuj ankoraŭ neniam parolis en niaj kongresoj. Ankaŭ tio montras progreson, ĉar iliaj sekcioj ne estas devigataj konfidi la delegitan taskon ĉiam al la samaj personoj.
Laŭ propaganda vidpunkto ĝi estis sukceso, ĉar la lingvo ricevis la pli - malpli - oficialan agnoskon de la urba estraro kaj la gazetaro.
Ankaŭ laŭ vidpunkto de kamaradeco tiu ĉi kongreso estas bona, ĉar neniu malagrablaĵo ĝenis la bonan harmonian atmosferon, kiu regis jam de sabato pasinta.
Montriĝis, ke niaj anoj estas konvinkitaj, ke la direkto, en kiu nia orga nizo estas gvidata, estas ĝusta kaj tiu konvinko estas valora por ni precipe nun, kiam estas necese, ke ni ne lasu nin tiri de ekstremaj celadoj, kiuj volas direkti nin unuflanke al politika batalo, aliflanke al senkolora neŭtraleco; ni volas esti kaj resti laboristoj, konsciaj pri sia devo disvastigi Esperanton por servi per ĝi la idealojn de sia klaso en la intereso de la tuta homaro !
El ĉio ĉi tio rezultas, ke nia 20a kongreso ankaŭ estas grava el vidpunkto *historia*.
Ni iros hejmen kun nova entuziasmo kaj nova laborforto por la sekvanta jaro, kiu devas prepari nin por la kongreso jubilea.
Dezirante al vi bonan vojaĝon kaj al viaj sekcioj fruktedonan laboron, mi fermas la kongreson.
Post kantado de Fratoj al Sun' la kongresanoj disiras por posta adiaŭa renkontiĝo en la Urba Parko.

Roterdama SAT-rondo.

En sia lasta kunveno, la Roterdama SAT-rondo decidis pridiskuti la jenajn punktojn:
1. Ĉu inviti la SAT-kongreson, Aŭgusto 1936 al Roterdamo?
2. Enkonduki: „La organizan problemon en la kadro de SAT.
3. Pridiskuti: „La frakcian sistemon kaj SAT. Vidu por 2-3 frontpaĝon kaj paĝon 36 Senn. 25 Marto 1935.
Esperante ke la gekamaradoj komprenas la gravecon de la ĉi supraj punktoj ni invitas ilin ĉeesti *la 19an de Majo matene je la deka kaj kvarono en „De Vereniging", Botersloot 101.* J. Bout.

Kongresherinneringen.

Kongresherinneringen?
O, zeker, vele zijn er en onuitwisbaar!
Dit 20ste kongres van de Federatie van Arbeiders-Esperantisten in Groningen was er één, zoals er slechts weinigen in de arbeidersbeweging voorkomen. Nog lange jaren zullen zij, die dit feest van kameraadschap hebben mogen meemaken, getuigen van al het goede en schoons dat hun daar geboden is. De kameraden, die dit feest verzorgden en voorbereidden, hebben de Federatie hiermede een dienst bewezen, welke niet hoog genoeg kan worden aangeslagen. Zij hebben bewezen, de zware en moeilijke taak, welke zij op zich genomen hadden, schitterend te kunnen vervullen.
Daar was in de eerste plaats de „interkamarada vespero".
Wat hebben we genoten bij het natuurlijk spel der „infanoj". Diep in ons hart voelden wij allen, dat de zaden, door ons gestrooid, beginnen te ontkiemen — nog langzaam, o ja, maar zeker. Wij begrepen dat daar de nieuwe generatie stond, die eenmaal ons werk zal overnemen en voortzetten en wij wisten ons zeker van de overwinning, nu wij de jeugd — zich met Esperanto zagen bemoeien. Ongetwijfeld komt hier hulde en lof toe aan haar die deze prestaties wist te bereiken.
En dan het kongres zelf ! Welk een vurig enthousiasme en medeleven. Hoe waren wij allen niet muisstil, bij de openingsrede van onze prezidanto, dit meesterstukje van welsprekendheid? Hoe gingen wij niet op in de debatten en hoe klopte ons aller hart, toen het er om ging „Sennaciulo", de internationale band, te behouden en te versterken? Wie geloofde niet in dat uur aan zijn roeping en besloot, met alle kracht die in hem is, voor „Sennaciulo" te vechten? Wij kunnen de voorstellers slechts dankbaar zijn voor deze „enquête", want allerduidelijkst is in dit kongres gebleken, dat voor het overgrote deel der leden „Sennaciulo" een stuk van hun leven betekent. Meer dan ooit moet nu toch wel gebleken zijn, dat alle pogingen om de eenheid en solidariteit van onze leden te breken, af zullen stuiten op de vastberadenheid en de onwankelbare trouw aan ons beginsel. Dat dit de proponintoj een les moge zijn.
Ook vrolijke momenten waren er in dit kongres. Of was het niet enig, toen bleek, nadat de voorzitter, onder luid applaus, verklaard had, dat van de pas opgerichte afd. Wieringen 6 van de 7 leden de reis naar Groningen per fiets hadden afgelegd, dat bij het appèl Wieringen officieel niet vertegenwoordigd was? En hoe gnuifden we bij het verhaal van de „blasfemanto, kiu ne ŝatis blasfemi?"
Fijn was ook het ogenblik, waarop kdo Degenkamp opstond en verklaarde, dat hij, indien de taalrubriek in L E behouden zal blijven, de pen opnemen zal en gaan schrijven, maar dat hij, wanneer zij ophoudt te bestaan, de pen zal opnemen en óók gaan schrijven. Hier voelden we de offervaardigheid voor ons ideaal van een kameraad, die bescheiden en onopgemerkt, zijn taak op grootse wijze vervult.
Kameraden, prachtig en welgeslaagd was dit kongres en wij kunnen slechts onze warme dank uitspreken tot degenen die het ons schonken en hopen, dat het kongres in Den Haag 't volgend jaar het zal evenaarden.
Slechts één feit was in staat het geluk en de vreugde enigszins te temperen: het feit, dat zovele van onze kameraden op dit vreugde feest niet aanwezig konden zijn. Daarom moet het onze dure plicht zijn te zorgen, dat volgend jaar ieder, die maar eventjes kon komen, aanwezig zij.
Richt reeds nu zoveel mogelik spaarkassen en fondsen op !
Wanneer wij vroeg beginnen, kan een klein bedrag per week voldoende zijn om reisgeld en logies te waarborgen. Zorgt dan dat je van de partij bent.
Pakt aan, nu, opdat ge in zo groot mogelijke getale aanwezig zijt om met ons gezamenlijk het 25-jarig bestaan onzer Federatie te vieren in het Jubileumkongres ! G. Vrees.

Festotago en Apeldoorn.

La 14an de Majo nia famkonata membro „Onklo Vilhelmo", laŭ la registro de la loĝantaro J. L. Slavenburg, festos sian sepdekan naskiĝtagon. La Apeldorna sekcio kompreneble ne pasigos tiun tagon nerimarkita.
Nia onklo do malgraŭ siaj multaj jaroj, estas unu el niaj plej fervoraj membroj, kiu neniam forrestas el niaj kunvenoj kaj al kiu neniam ni vane nin turnas. „Onklo" kiel eksinstruisto kaj ŝercemulo ĉiam scias eltrovi ion por altiri la atenton. Plenrajte ni povas diri, ke en nia sekcio li estas nemankipova. La Apeldorna sekcio deziras al Onklo ankoraŭ multe da jaroj por li kaj lia familio, por nia sekcio kaj por nia movado esperanta.

Por la sekcio Apeldoorn:
G. de Weerd, sekr.

(La Fed.-estraro aldonas koran gratulon por nia konata fervorulo.)

AVERTO.
„Nia Organo" de la sekcio Heerlen skribas: Eksterlanda esperantisto, nome Karel Maŭriĉ, vizitas niajn membrojn por instigi ilin agi kontraŭ nia sekcio kaj kontraŭ la Federacio, kaj por IPE. Ni petas ĉiun tuj scii la estraron pri tiaj klopodoj, kaj pritrakti tiun Maŭriĉ kiel li meritas: kiel friponon. Kiu deziras scii pli multe pri li, petu informojn ĉe la sekretario de sekcio Heerlen. J. Sterken.

ONZE TAALRUBRIEK.

DE VOORZETSELS II.

BENEDEN.

